Landa Kunveno de NEL, Tromsø, 11ª-12ª de junio 2011

Mallongigoj por la menciotoj en la protokolo:

AKB: F-ino Anne Karin Bondhus
AM: F-ino Amelie Matt
AOM: S-ro Arne-Olav Mjøen
AS: S-ro Andrej Sorokin
DD: S-ro Douglas Draper
EEF: S-ino Eli Eriksen Fitjar
HK: S-ro Helge Knudsen
HO: S-ro Herolv Olsen
HR: S-ro Herman Ranes
IR: S-ino Ingebjørg Rambjør
JEA: S-ro Jardar E Abrahamsen
JPA: S-ino Judith P Abrahamsen
KPH: S-ro Kjell Peder Hoff
KRH: S-ro Kristoffer Robin Haug
LAS: S-ro Leif Arne Storset
LR: S-ino Ljuba Rouget
ML: S-ino Marianne Lund
MM: S-ro Mario Machlik
OP: S-ro Otto Prytz
TK: S-ro Torstein Kvakland
UL: S-ro Ulf Lunde
US: S-ro Ulf Stenhaug

Aliaj mallongigoj uzataj:

ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
LK: Landa Kongreso
NE: Norvega Esperantisto (gazeto)
NEFA: Norvega Esperantista Fervojista Asocio
NEL: Norvega Esperantista Ligo
NJE: Norvega Junulara Esperantista
PDF: Portebla dokumentformo
SES: Studenta Esperanto-Societo
TTT-ejo: retpaĝaro

Estis 21 partoprenantoj en la Kongreso.

1. Malfermo

La prezidanto de la loka klubo, Amelie Matt, bonvenigis al Tromsø kaj malfermis la landan kunvenon.

La prezidanto de NEL, Jardar E. Abrahamsen, laŭtlegis bondezirojn de la dana E-asocio.

La ĉeestantoj ĉe la malfermo (JEA, UL, OP, AM, JPA, HK, IR, AKB, DD, MM, HO, KPH, HR, AOM kaj LAS) prezentis sin. Poste alvenis AS kaj KRH, LR (kun sia 11-jaraĝa filino Aleksandra), kaj en dimanĉo ankaŭ ML. Speciala gasto estis S-ro Andrej Rjazancev, prezidanto de la E-klubo de Murmansk.

Oni okazigis momenton de silento pro la ses forpasintaj membroj: S-ino Kirsten Bonnevie (Lillehammer), S-ro Ola G Hårdnes (Elverum), S-ro Per Johan Krogstie (Hamar), S-ro Egil O. Larsen (Hamar), S-ro Kåre Pedersen (Oslo) kaj S-ro Odd Tangerud (Oslo).
Prezento kaj aprobo de la tagordo.
Kolekto de plenrajtoj.
S-ino Elna Matland kaj EEF donis plenrajtojn al IR.
S-ro Agnar Fitjar donis plenrajton al HK.
Kiel kunvenprezidanto elektiĝis: Arne Olav Mjøen.
Kiel raportanto elektiĝis: Ulf Lunde.
Kiel subskribontoj de la protokolo elektiĝis: Mario Machlik kaj Leif Arne Storset.

2. Jarraportoj

Oni traktis la jarraportojn pri 2009 kaj 2010 paralele. Ili troviĝas en *Norvega Esperantisto* 4/2010 kaj 2/2011 respektive.

A. EKSTERA INFORMADO

Amaskomunikiloj

Stariĝis demando pri la fidindeco de la registritaj nombroj de gazetaraj mencioj. Ulf Lunde (UL) respondis, ke kvankam la nombroj certe estas iomete tro malaltaj, ili tamen respegulas la veran kvanton da mencioj.

Interreto

Mario Machlik (MM) raportis, ke la Tromsø-klubo faris retpaĝon kaj ankaŭ iom aktivas en *Facebook*.

Douglas Draper (DD) demandis pri *Twitter*. Ĝi estas ne multe uzata. NEL havas 36 abonantojn tie, ĉefe esperantistojn (do ne vere la celgrupo).

Informbudoj/prelegoj

DD rakontis pri la informmetodo de Bjørn Øyen [vd. NE 2/2011].

Otto Prytz (OP) atentigis, ke mankas mencio de la prelego, kiun DD faris en la Holokaŭst-muzeo en marto 2010, kaj ke okazis informkunveno kun prelego de Astrid Mansrud pri esperantokongresoj en septembro 2009 en *Bekkelaget seniorsenter* en Oslo.§

Kjell Peder Hoff (KPH) menciis, ke li starigis ekspozicion pri Esperanto en la bibliotekoj de Strømmen kaj Rælingen [apud Oslo] en 2010.

Informiloj

La kasisto, AKB, memorigis, ke NEL ricevis mondonacon por eldoni novan broŝuron, kaj ke do ekzistas certa premo por baldaŭ fari tion.

Informpetoj

OP proponis, ke ni povas mencii en estontaj jarraportoj ke la intereso de la publiko manifestiĝas per tio ke oni serĉas nian retpaĝon. Tial menciindas (laŭ lia opinio) sinturnoj per Interreto, ekz-e por montri ke la nombro de la serĉoj kreskas kiam Esperanto estas menciita en iu krimromano.

B. INSTRUADO

Ĉeestaj kursoj

Arne Olav Mjøen (AOM) menciis, ke en Trondheim okazas interparolada studrondo dum ĉiu klubkunveno§, kaj ke ili ricevas subvencion de la Ŝtato pro tio.

Interretaj kursoj

Stariĝis demando pri la fakta nombro de la partoprenantoj de ekz-e *Lernu!*. Judith P. Abrahansen (JPA) espondis, ke la ekzakta nombro de la registritoj estas 402, sed ni ne scias, kiom el ili aktivas.

Pri *Esperanto Viva!* de Ian Fantom, DD rakontis, ke la kurso pli-malpli formortis pro trookupiteco de la verkinto mem.

UL diris, ke en la virtuala mondo, Dua Vivo, regule okazas prelegoj pri Esperanto, kaj ke la aŭskultantoj ofte estas ne-esperantistoj.

MM raportis, ke la hejmpaĝo de la Tromsø-klubo reklamas por interretaj kursoj (*lernu.net*), sed tiu paĝo ekzistas nur en Esperanto. JEA mencis, ke la retejo esperanto.no prezentas liston da kursoj.

DD proponis inviti *Lernu!*-anojn al klubaj kunvenoj.

OP avertis, ke tio povas esti malpopulara. Li metas demandosignon ĉe la efiko de nia kutima maniero varbi. Eble nia varbemo havas la efekton de malpropagando, ĉar ni trudas la tutan movadon al tiuj, kiuj interesiĝas nur pri la lingvo.

Sabato, 1000h
Okazis 15-minuta paŭzo, kun pagado de Uhlen-subvencioj.

Ekzamenoj

OP diris, ke la ekzamena komisiono nur vegetis dum la lastaj jaroj. Ĝi antaŭ kelkaj jaroj provis konformigi la ekzamenan sistemon de NEL al tiu cetere uzata en Norvegio: elementa ekzameno similu al bazlerneja ekzameno pri fremdlingvo, la meza ekzameno koincidu kun gimnazia ekzameno, kaj supera ekzameno (malnove: "instruista ekzameno") devus koincidi kun (kaj postuli ne pli da laboro ol) iu universitata ekzameno, eble unusemestra "grunnfag". Sed en 2003 okazis la tiel nomata "kvalitreformo" de la altlerneja/ universitata sistemo. Tio iom paralizis nin, kaj nun ni fakte ne scias, kiel formi la plej altan E-ekzamenon tiel ke ĝi similu al iu norvega universitat-ekzameno.

Li ricevis neniujn sinturnojn pri ekzamenoj lastatempe. En praktiko fakte ne estas tempo por fari skriban ekzamenon dum la Landaj Kunvenoj, kiel la statuto admonas.

DD proponis stimuli la intereson pri ekzamenoj per artikolo en *Norvega Esperantisto.*

OP diris, ke oni povas ankaŭ instigi la homojn fari internaciajn ekzamenojn, ekz-e tiujn de ILEI.

KPH proponis fari instru-rondojn pri ekzamen-aktualaj temoj dum klubkunvenoj, por ke la membroj povu prepari sin por ekzamenoj.

AOM demandis pri la kialo por havi ekzamenojn entute. OP respondis, ke iuj instancoj aprezas diplomojn, kaj oni esperis enkonduki E-on en la norvegan edukan strukturon, farante pretan sistemon (instruplanojn, ekzamenojn, ktp) kiun eblas integri en la lernejan strukturon. Tiaj niaj petoj estis tamen ĉiam rifuzitaj, sed ni ŝatus ankoraŭ esti preparitaj por la okazo, ke oni iam venos al ni kaj demandos, ĉu ni havas ian ekzamenan sistemon.

Helge Knudsen diris, ke estos tro malfrue establi tian sistemon je tiu tago, kiam iu venos kaj demandos. Tial

la laboro de OP kaj la komisiono estas valora por NEL.

Faksekcio de instruistoj

Responde al demando de KPH, AKB informis ke estas ĉ. 7 membroj. (La "faksekcio" funkcias en la lastaj jaroj nur kiel peranto de abono de *Internacia Pedagogia Revuo*.)

C. KONTAKTO KUN LA KLUBOJ KAJ MEMBROJ

Kluboj

DD opiniis, ke tio ĉi devus esti kerna afero. Li ŝatus havi pli da kontakto kun la lokaj kluboj.

AKB diris (ĉefe pri la klubo de Bryne): Eĉ se oni ĉasas ilin por igi ilin verki raportojn, ne okazas multe.

Seminario

La kunveno atentigis, ke la Estraro agis kontraŭe al la laborplano kiam ili ne faris seminarion en 2010, sed estas kompreneble, ke oni ne volis fari multe da laboro por seminario, al kiu venus nur manpleno da partoprenantoj, en praktiko preskaŭ nur la NEL-estranoj mem.

Norvega Esperantisto

Oni laŭdis la regulan aperadon de *Norvega Esperantisto*, kiu tre bone funkciis dum tiu ĉi periodo. La kutimo anonci en ĉiu numero la limdaton por kontribuoj al la sekva, estas tre bona. La kunveno aplaŭdis la redaktoron.

OP menciis, ke li trovis precipe interesa interalie *Inter Ni Dirite*, sed ke li kiel blindulo malfacile povas legi la ofertitajn PDF-dokumentojn.

Raportoj kaj cirkuleroj

La estraro diris, ke ĝi nur pasive atendas la raportojn de la kluboj kaj sekcioj, ĝi ne aktive postulas ilin.

Aldonindas, ke la Tromsø-klubo ekde 2010 havas propran retpaĝon, kaj ke ili nun kunvenas regule.

Ĉ. ALIAJ PROJEKTOJ KAJ APLIKOJ

Vortara projekto

JEA informis pri la lastatempa disvolviĝo kaj la stato de la vortara laboro, prezentante raporton verkitan de Kjell H Ullestad en majo 2011. Okazis longa diskuto.

OP opiniis, ke la laboro nun daŭris tro longe, kaj ke iu iel devas ion fari. Li esperas, ke la Estraro aktive entreprenos ion por akceli la laboron. Pli valoras aperigi bonan vortaron venontjare ol atendi ĝis aperos perfekta vortaro (neniam). Se oni ne povas presigi ĝin, oni faru ĝin rete.

OP daŭrigis: Ni bezonas novan vortaron el ĉi tiu jarmilo. La plej nova norvega-esperanto vortaro eldoniĝis antaŭ 48 jaroj. Tio ne estas bona argumento por montri, ke Esperanto ankoraŭ vivas. Oni verŝajne ne vendas

tiom malnovajn vortarojn de aliaj lingvoj.

Turismo

OP kaj DD raportis, ke Cato Haugen ekzameniĝis kiel ĉiĉerono por Oslo en 2011, kaj sukcesis pri la buŝa parto, sed bedaŭrinde lia skriba respondo ne aprobiĝis.

DD raportis, ke Oslo-ĉiĉeronino Tamiko Kawakami havis akcidenton kaj ankoraŭ ne povas tute normale funkcii.

Reĝa medalo

La kunveno rigardis fotojn de la ceremonio, kie S-ino Elna Matland ricevis la Reĝan medalon Pro Merito.

D. **ADMINISTRADO**

Retservilo

JPA informis, ke ekzistas ebleco transiri al senpaga servilo ĉe ŝia laborejo.

La oficejo

La kunveno aplaŭdis DD pro ties konstanta laboro en la oficejo. DD raportis, ke li nun estas plentempa pensiulo kaj havas pli da tempo por "la vere gravaj aferoj", nome tiuj de NEL.

Teknikaĵoj

DD laŭdis – kaj la kunveno aplaŭdis – Herman Ranes pro ties laboro pri la komputilo dum siaj vizitoj en Oslo. Danke al li, nuntempe estas neniaj komputilaj problemoj en la oficejo.

Esperantonia

KPH plendis pri la decido meti la malnovajn eksterlandajn gazetojn en la kelo, ĉar li devas porti pezajn skatolojn el la kelo kiam iu mendas aŭ bezonas iun malnovan numeron. Li preferus havi ilin ordigitajn sur bretoj.

OP diras, ke tio estas administracia afero kiun devus pritrakti ne Landa Kunveno, sed bone funkcianta komisiono. Li tamen citas retpoŝte ricevitan rekomendon de Cato Haugen kaj Asbjørn Lindh, ke oni forigu la restarigitajn librobretojn el Esperantonia.

DD replikis ke la koncerna bretaro tute ne konsumas plankospacon en la kunvenĉambro, ĉar ĝi staras sur ŝrankoj.

Membrostatistiko

KPH kaj OP demandis, ĉu oni forigis el la statuto la punkton, kiu diris, ke por nomi sin klubo oni devas havi minimume 5 membrojn.

JEA konfirmis, ke ne. Laŭ tiu regulo, Hamar kaj Kristiansand ne plu havas asociojn kiuj rajtas esti membrokluboj de NEL. (La klubo de Kristiansand estas en la praktiko malfondita de la sola restanta aktivulo, Roar Dokmo, kiu transsendis la kluban kapitalon al NEL en januaro 2011.)

La estraro skribe atentigu la klubojn pri tio, kaj instigu al almenaŭ Hamar varbi novajn membrojn por daŭre funkcii kiel aliĝinta klubo de NEL. Laŭ UL kaj OP, ekstera informado pri

tiu averto al la kluboj (en gazeto aŭ en *Facebook*) eble povos allogi novajn membrojn.

Sabato 1130h
Okazis paŭzo, kun disdonado de esperantopingloj.

Sabato 1200h
Belarto: Andrej Sorokin ludis gitaron.

Legaco Rolf Uhlen

Oni estis preparinta revizion de la statuto, pro la cedo de la fervojista asocio NEFA.

Stiftelsestilsynet kaj la legaco mem devos aprobi la novan statuton antaŭ ol ĝi ekvalidas, do la landa kunveno elektu novan Uhlen-estraron laŭ la ankoraŭ valida malnova statuto. Neniuj reguloj kontraŭas, ke la estraro de NEL povos eventuale elekti kromajn reprezentantojn poste.

Junularo

LAS raportis mallonge, ke 2009 estis aktivega jaro, 2010 malpli aktiva.

Studenta Esperanto-Societo (Oslo)

LAS raportis mallonge pri la duone dormanta stato de SES.

E. KONKLUDO

(Ljuba kaj Aleksandra ĉeestis ekde tiu ĉi punkto)

Neniuj komentoj.

La jarraportoj por 2009 kaj 2010 estis aprobitaj kun la ĉi-supraj aldonaĵoj.

3. Jarkalkuloj

La kasisto, Anne Karin Bondhus, prezentis la ĉefajn nombrojn.

La plej grava tasko rilate la ekonomion estas kapti novajn luantojn de Esperantonia, alikaze la domkonto estos malplena jam ĉi-jare.

DD atentigis, ke la renovigo estas finfarita nur en la kunvenĉambro.

UL havis korekteton al la 2010-jarkalkulo, la domkonto: «Pago por la tubara laboro» devus esti en 2008, ne 2009.

La revizoro anoncis, ke li ne trovis erarojn, sed ke la formalan raporton li devos postsendi, ĉar mankis al li la lastaj bilancoj de la akciaj fondusoj. La ekonomia situacio estas laŭ li sufiĉe stabila, se ni sukcesos ekhavi novajn luantojn en Esperantonia. La nova estraro ne pasive lasu al la klubo de Oslo sola trovi novajn luontojn. Verŝajne necesas aĉeti anoncojn ie (finn.no?).

DD rimarkigis, ke unu kaŭzo de la stabila ekonomio estas ke ni tute ne uzas monon por io produktiva, kiel produktado de informiloj.

La jarkalkuloj por ambaŭ jaroj estis aprobitaj de la landa kunveno.

4. Ricevitaj proponoj

Unu propono estis ricevita: forigi la mencion de Eldonejo Esperanto el la statuto (§ 18), ĉar la Eldonejo ne plu ekzistas. La kunveno aprobis la proponon.

La stoko de vendeblaj libroj de la Eldonejo estas transigita al la Oslo-klubo, kiu rajtas disponi ĝin laŭ sia bontrovo.

Sabato, 1300h
Lunĉo

Sabato, 1430h
Vizito al Muzeo

Sabato, 1930h
Festena vespermanĝo: Spicbakita lofiaĵo kun freŝaj legomoj, salbakitaj terpomoj. Ĉokoladfonduo kun vanilla glaciaĵo.

Dimanĉo, 0940h:
IR kaj UL instigis la ĉeestantojn al subskribado de saluto transdonota al S-ino Elna Matland, kiu ne povis veni pro serioza malsano.

5. Laborplano 2011-2013

JEA klarigis la diferencojn inter la malnova laborplano kaj la propono pri nova.

Ekstera informado

Okazis diskuto pri tio, kiam kontakti la gazetaron pri novaĵoj, kaj kiel trovi (aŭ krei) interesajn novaĵojn pri Esperanto.

MM rakontis pri siaj spertoj rilate lokan gazeton.

OP proponis aldonon al la punkto Amaskomunikiloj: "verkante leteron de leganto pri debatata afero kiam la cirkonstancoj invitas al mencio de Esperanto"

JEA demandis: Kies tasko estu, verki tiujn leterojn?

DD diris, ke ni provu eviti, ke ĉiam la sama nomo aperu kiel leterverkinto.

OP opiniis, ke ni devas fidi al niaj membroj ke ili mem, proprainiciate, se ili vidas ke en iu gazeto aperas io grava, kio povas esti ligita al Esperanto, povas verki artikolojn kaj subskribi tiujn kiel membroj de NEL.

MM proponis, ke almenaŭ pri la 100-jariĝo ni devas provi aperigi ion en la gazetoj.

MM sentis la mankon de *Esperanto-nytt*, kaj demandis, ĉu eblus de tempo al tempo fari unu norveglingvan numeron de *Norvega Esperantisto*,

kiun oni povus montri al norvegaj interesitoj.

DD klarigis, kial ni rezignis pri eldonado de *Esperanto-nytt*.

OP proponis meti la plej freŝajn novaĵojn en www.esperanto.no, en la norvega, kaj ke ni povas nomi tion "Esperanto-Nytt". Tio verŝajne estas malpli kosta kaj laboriga ol verkado de papergazeto, kaj povas iel kompensi por la mankanta *Esperanto-nytt*-gazeto.

OP demandis pri la TTT-ejo, ĉu ĝi nuntempe havas redaktoron, kaj kiel ĝi funkcias. JEA (la redaktoro) kaj JPA respondis, rakontante (kaj eĉ montrante filmeton) pri la historio de la retpaĝoj kaj iliaj defioj.

JPA ofertis transpreni la paĝojn al sia laboreja servilo senpage. UL informis, ke similaj servoj nun haveblas (ekz-e ĉe *Domeneshop.no*) kontraŭ ĉ 50 kr monate.

MM prezentis la paĝojn de La Norda Lumo, kiuj situas en *Wordpress* tute senpage. Li proponis, ke se mankas novaĵoj en la NEL-paĝoj, NEL povas ĉerpi el la retpaĝoj de Tromsø. Tromsø provas ĝisdatigi siajn novaĵojn proksimume unu fojon monate.

Marianne Lund rakontis, ke en Tromsø oni foje informas subtile pri Esperanto tute sen propagando. Ekz-e ili invitis pupteatriston el Germanio, kiu faris pupteatraĵon kaj kurson pri pupfarado dum la [urba] Internacia Semajno, ne uzante Esperanton, sed en la programo estis skribite, ke Tromsø Esperanto-klubb invitis lin. Kaj ĉi-somere Kimie Makarian el Japanio faras instruadon pri i.a. origamio per Esperanto kun tradukanto de Tromsø esperantoklubb.

AKB menciis, ke antaŭ kelkaj tagoj ŝi ricevis peton de ĵurnalisto traduki kelkajn frazojn al Esperanto por uzo en iu somera programo.

Oni diskutis la planojn por eldoni novan broŝuron. NEL ricevis plurajn mon-donacojn dediĉitajn al tiu celo. Verŝajne ni reprenos de la danoj la broŝuron kiun ili prenis de ni antaŭ jaroj, ĉar intertempe ni perdis la grafikaĵojn por ĝi.

MM montris malgrandan broŝuron de la franca E-junularo. Li diris, ke foje sufiĉas fari ion okulfrapan kun nia retadreso. Li proponas formaligi kunlaboron kun eksterlandaj E-organizoj pri produktado de tia materialo. Ni provu trovi inter ni kapablajn homojn pri tiaj aferoj.

Instruado

ML demandis, ĉu ekzistas planoj denove inviti profesian instruiston kiel Atilion, ĉar tion ili tre ŝatis.

OP rakontis, ke estas risko, ĉar dum la lastaj fojoj la afero ne estis tiom sukcesa kiel dum la unuaj.

LAS petis, ke se NEL faros tion denove, ili faru ĝin kunlabore kun NJE.

DD opiniis, ke ni devas kombini la retkursojn kun praktika parolado aŭ kontakto kun la kluboj iel.

MM demandis pri la ebleco en *Lernu!* rekte kontakti aliajn uzantojn kiam oni estas fininta komencantan kurson.

JPA respondis, ke tio eblas, kaj donis plurajn ekzemplojn pri manieroj tion fari.

Ofertoj al la membroj

DD demandis, ĉu necesas konkretaj reguloj por tio, kiel la estraro tenu kontakton kun la kluboj, ĉar tio nuntempe ne bone funkcias, krom kun tiuj kluboj, kiuj estas reprezentataj en la liga estraro (Oslo, Bergen, Trondheim, Bryne, Tromsø).

OP demandis, ĉu valoras mencii la seminarion en la laborplano. La intenco origine estis, ke la membroj havu eblecon renkontiĝi ankaŭ dum la jaroj kiam ne okazas Landa Kongreso. Retaj seminarioj nur por havi seminarion ĉar tio estas postulata de la laborplano, ne multe kontribuas al sociala kunestado, kaj ne havas multan sencon, almenaŭ ne se ne povas iel okazi aktiva interbabilado inter la partoprenantoj.

DD opiniis, ke oni ne forstreku ĝin, ĉar ĝi estas grava oferto al la membroj kiam ne okazas landa kongreso.

MM proponis mildigi la postulon kaj skribi "provas" anstataŭ "prioritatas"§. Li opinias, ke seminario havu iun praktikan celon, ekz-e vortarlaboron aŭ verkadon de retpaĝoj.

AKB, JEA kaj Ingebjørg Rambjør diris, ke la problemo estas aktivigi la homojn, tiel ke ili fakte venu al seminario.

Okazis voĉdonado pri la fina vortumo .

Lingva Laboro

UL diris, ke la estraro eble vortumus la punkton pri Vortara projekto en alia maniero post la ricevo de la raporto de Kjell H. Ullestad

Dimanĉo 1130:
MM prezentis la programon por la "postkongreso" (la ekskursan programon por la dimanĉa posttagmezo kaj por lundo).

LAS informis pri la Landa Kunveno de NJE, la nova estraro tie, kaj iliaj planoj pri ontaj renkontiĝoj por la norvega E-junularo kaj najbaraj junularaj organizoj.

Dimanĉo 1200h:
IR parolis pri la sanstato de S-ino Ester Olsen, kaj la ĉeestantoj subskribis saluton ankaŭ al ŝi.

Elektoj

OP prezentis la proponon de la elekta komisiono.

Temis plejparte pri reelektoj. Sed nova estrarano de NEL estas Mario Machlik (Tromsø). Kaj en la estraro de la legaco Uhlen Torstein Kvakland estas nova reprezentanto (antaŭe anstataŭanto), dum Judith P. Abrahamsen kaj Helge Knudsen estas novaj anstataŭantoj.

Estraro de NEL:
Prezidanto: JEA (reelektita)
Vicprez.: UL (reel)
Sekretario: IR (reel)
Kasisto: AKB (reel)
Estrarano: MM (nova)
Estrarano: AL (reel)
1[a] anstataŭanto: EEF (reel)
2[a] anstataŭanto: AOM (reel)

Arĥivestro: DD (reel)
Revizoro: HK (reel)
Vicrevizoro: US (reel)

Legaco Rolf Uhlen:
Unua reprezentanto: TK (nova)
Anstataŭanto por la 1[a] reprezentanto: JPA (nova)
Dua reprezentanto: AOM (reel)
Anstataŭanto por la 2[a] reprezentanto: HK (nova)

Domkomisiono:
TK (reel)
Anstataŭanto : HR (reel)

Elekta komisiono (ĉiuj novaj):
Amelie Matt (gvidanto)
Herman Ranes
Kjell Peder Hoff.

6. Loko por la venonta Landa Kongreso

Iu proponis Sarpsborg, sed la kunveno havis la impreson, ke la klubo tie ne havas fortojn por tion fari, kaj DD cetere memoras, ke Rolf Bergh post la kongreso en 1993 diris, ke tiu nepre estis la lasta, kiun li aranĝas.

La Landa Kunveno deziras, ke la Landa Kongreso en 2013 okazu en Oslo kaj petas la klubon tie pristudi, ĉu tio estos ebla. Se tio ne eblos, la Liga Estraro devos trovi aranĝonton por la Landa Kongreso 2013.

7. Fermo

La prezidanto de NEL dankis pro vere bona kongreso kaj la LK aplaŭdis la aranĝintojn.

Nia gasto, Andrej Rjazancev el Murmansk donis paroladon pri la 20-jara klubo en Murmansk kaj esprimis deziron pri pli ampleksa kontakto inter ĝi kaj la klubo de Tromsø, kaj inter REU kaj NEL. Li invitis esperantistojn kiuj interesiĝas pri Rusio, gasti ĉe li en Murmansk.

Fermaj vortoj far MM.

Aleksandra Rouget ludis violonon.

La landa kunveno komenciĝis sabaton matene kaj finiĝis dimanĉon tagmeze.

Dimanĉon posttagmeze kaj en lundo okazis neoficala programo / postkongreso.

Tiu ĉi protokolo estas verkita de Ulf Lunde kaj kontrolita de Leif Arne Storset kaj Mario Machlik.